

Pascal Dubourg Glatigny: Heinrich-August Luyken (1)

Radioprelego, SRI 1990, 006-A-3

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-006/SRI-1990-006-A-3-Pascal-Dubourg-Glatigny-por-Claude-GACOND-Heinrich-August-Luyken-L.mp3>

PDG.- Saluton! Por la Esperanto-Fako de Svisa Radio Internacia parolas Pascal Dubourg Glatigny, anstataŭante Claude Gacond.

La pasintan semajnon mi havis okazon paroli pri vespero, kiun mi organizis antaŭ du semajnoj en la Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds. Vespero, kiu donis al mi la eblon, konatigi iom, pli intimigi la homojn, la esperanto-progresantojn kun nia literaturo. Kaj hodiaŭ mi dezirus sekve al tio paroli pri unu verkisto, kiu verŝajne estas ne sufiĉe konata kaj tro neglektata de la nunaj esplorantoj de nia literaturo kaj de la legantoj ĝenerale. Temas pri Heinrich August Luyken, kiu verkis kiel ĉefan romanon, kutime oni konas lian ĉefan romanon ankaŭ tiu, kiu estas ankoraŭ disponebla sur la merkato, estas [Pro Iŝtar](#).

Pro Iŝtar, romano, kiu eldoniĝis jam en 1924, do antaŭ ege multaj jardekoj, kaj kiu estas ankoraŭ disponebla, la unua eldono, ĉar oni en tiu tempo faris ekstreme altan nombron da presoj de la libro. Kaj kiu dank' al tio restas atingebla por la leganto.

Luyken naskiĝis en Germanio, kaj li naskiĝis preskaŭ en la mezo de la pasinta jarcento, en 1864, kaj li estas figuro do de la plej fruaj, kiel la plej fruaj esperanto-pioniroj de la plej fruaj esperanto-verkistoj. Sed li kontaktiĝas kun Esperanto nur en 1904, do Esperanto jam ne plu estis kompleta bebo, sed io kun iom da literaturo ĉirkaŭ ĝi. Kaj la fakto verki en Esperanto jam en tiu dato, do ankaŭ li komencas verki. La unua libro aperas nur en 1912, kaj la fakto verki en tiu epoko ne estas tiom pionira, kiom antaŭe. Kompreneble ekzistas io, kaj kiam oni verkas en tiu tempo, oni konstruas sur ion, ne en la nebulo, en la dezerto.

Luyken ne havis tre interesan vivon, mi devas diri sincere, sed li havas tre specialan trajton, specialan ankaŭ por la epoko. Estas, ke en 1885 li edziĝis al anglino kaj translokiĝis al Britio, kaj en 1910 li transprenis la anglan naciecon. Tio estas tre grava, ĉar do la tempoj, kiuj venos poste, la unua mondmilito, tuj post lia angliĝo, fakte, estos absolute renversaj eventoj por Eŭropo, kaj ne estas tiom da homoj, ni devas konstati, kaj tiom da esperantistoj en tiu tempo, kiuj vivas tre internacian vivon. Tiom internacian, ke ĝi kondukus ilin al dukultureco, ĉar fakte estis la kazo de Luyken, germana kaj angla kulturo estis por li el sia posedaĵo.

Kutime oni konas Luyken sub la ŝildo, ni povas diri, sub la ŝildo de moralista verkisto, moralista verkisto de la evangelia kristanismo. Estas stranga ŝildo, mi povus diri, tio tute ne estas malvera. Oni devas konstati kiam oni legas Luyken, ke lia celo estas moralista kaj ke lia celo estas fakte propagandi por la evangelia kristanismo. Sed estus eraro same redukti Luyken al nur moralista verkisto, kiel povas esti abundego en ĉiuj lingvoj kaj abundego en tiu komenco de jarcento, ke la libroj, kiujn li verkis, estas nur kvar, do tamen kvar imponaj romanoj kun amplekso normala, oni povus diri, ĉiam havas tiun moralan trajton, sed ankaŭ li portis ion al la esperanta literaturhistorio.

La du romanoj, kiujn li verkis, estis antaŭ la unua mondmilito kaj poste estas strange, ĉar la du aliaj venas grupe, oni povus diri, kaj preskaŭ dek jarojn poste.

La du romanoj estas [Paŭlo Debenham](#), la unua, kiun li verkis en la jaro 1912, kaj poste venas [Mirinda amo](#) unu jaron poste en 1913. Do, estas tre malfacile trovi tiujn romanojn nun kaj legi ilin. La nura ebleco iom kontaktiĝi kun ili estas legi la Libron de romanoj de Vilmos Benczik, do kiu havas skemon, laŭ mi tute kritikeman en la senco ke li proponas resumon de la romanoj por, li diras, la hodiaŭaj legantoj, kiuj ne plu havas tempon por legi. Kaj mi trovas tiun koncepton iom bedaŭrinda kaj iom reduktiva por la literaturo ĝenerale kaj por niaj esperanta literaturo, kiu ne estas tiom vasta kaj tiom konata, ke oni povas permesi al si legi la kompletan verkon. Tamen vi povas trovi kelkajn eltiraĵojn, specimenajn eltiraĵojn de tiuj du romanoj en la Libro de romanoj de Benczik.

La dua periodo, ni povus diri, venas multe pli interesaj romanoj en la verko de Luyken. Kaj temas pri [Stranga heredaĵo](#), en 1922 kaj Pro Iŝtar, en 1924. Ni havos la okazon pli dense paroli pri Pro Iŝtar, iom poste. Sed unue mi devus paroli pri la vera teknika aŭ koncepta novaĵo, kiun Luyken enkondukis en la esperantan romanon.

Oni povus diri senprobleme, ke Luyken estas fakte la inventinto, la importinto de la alegoria romano en nia lingvo. Kial alegoria romano? Tion mi klarigos iom poste, sed unue mi deziras paroli pri la skemo de la romanoj de Luyken.

La skemo estas tre simpla kaj ĉiam estas la sama skemo en la kvar romanoj. Temas ĉiam pri kristano, kiu troviĝas en momento de sia vivo sufiĉe malfacila, mi diru, kaj kiu troviĝas en turmento, turmentita de la hereziaĵoj kaj de la materialaj tentaĵoj.

En Pro Iŝtar oni trovas tre klare la batalon inter la vera kredo por Jehovo kaj la babilona idolismo. Kaj la heroo devas kontraŭbatali, ne konvinkiĝi de la idolismo kaj rezisti por daŭrigi en la ĝusta vojo, en la vera kredo por Jehovo. Kaj la heroo, tamen li enkondukas ion pli sukan, ni diru, la heroo estas la bela kaj inteligenta, certe, Zalmuna. Kaj Zalmuna havas multajn homojn kaj virojn ĉefe, oni devas diri, ĉirkaŭ si kaj ŝi devas lukti kontraŭ tiu malbona spirito, kontraŭ la malbona kredo.

Mi diris, ke temas pri alegoriaj romanoj. Kial? Ĉar la personoj, kiuj rolas en tiuj romanoj ĉiam estas ma...istaj figuroj. Ili estas alegorioj de la pasioj kaj de la virtoj. Do oni tre bone povas renkonti iun, kiu reprezentas la donon, iun, kiu reprezentas la forton, alian, kiu reprezentas, mi ne scias, iun malbonan trajton, pasion, do por la kristanoj. Kaj la herooj estas perfekte en la roloj, kiujn atribuis al ili la aŭtoro. Ili neniam deflankiĝas, ili ĉiam restas fidelaj al sia rolo. Kaj tio kondukas fakte Luyken al kompleta forigo de la homeco, de la ŝanceletoj en la homo. Kaj tio estas tre interesa, ĉar se oni klopodas situigi lin en la ĝenerala historio de tiu tempo, oni vidas, ili estas tute senintereso por la psikologio. Estas tiam la naskiĝanta psikologio, la interesiĝo por la psikanalizo, kaj estas la laboroj de Freud, kiuj aperas en tiu tempo, kaj la psikologia romano ankaŭ aperas kaj oni vidas ekzemple en Italio [...] kaj aliaj. Kaj same al tiu manko de intereso por la psikologio, Luyken tute seninteresiĝas pri la socio, pri la historio, kiu ĉirkaŭas la homon en tiu tempo kaj estas sufiĉe bedaŭrinde, ĉar ĝuste en tiu tempo aperas gravaj problemoj, kiuj kondukis fakte al la unua mondmilito. Kaj li tute ne interesiĝas pri la socio kaj oni devas tamen konstati, ke la plej dominanta tendenco de la esperanto-literaturo en tiu tempo estas la realismo. Oni vidas en Berlino, do okazas en Berlino la romano, kiel vi scias, Metropoliteno de la ruso Varankin. Sed ankaŭ Stela Nengon kaj Jean Forge, la polo Jean Forge, estas romanoj ĉefe bazitaj sur la realismo. Ĝis reaŭdo!